

Pri la brazila imperiestro Petro la 2-a (1)

En februaro de 2017 mi produktis du artikolojn pri imperiestroj. En la unua mi informis pri la vorto “imperiestro” kaj ĝiaj tradukoj en kelkaj lingvoj; en la dua mi mallonge montris, kie kaj kiam estiĝis kelkaj imperioj.

Pri Brazilo mi diris jenon:

Brazilo estis portugala kolonio. Kiam la francoj okupis Portugalion, la portugala reĝo kaj lia familio fuĝis al tiu kolonio (en 1808). En 1821 li decidis reiri al Portugalio. La Reganta Princo – Petro – restis en Brazilo por regi la kolonion. Sed ekzistis fortaj movadoj por igi Brazilon sendependa de Portugalio. La ĉefoj konvinkis la princon deklari la sendependecon, kaj li iĝis imperiestro de Brazilo (kun la nomo Petro la 1-a) per aklamo en 1822. La brazila imperio daŭris ĝis 1889. Tre grava kaj klera imperiestro estis Petro la 2-a, kiu regis dum pli ol 40 jaroj, de 1841 ĝis la fino de la imperio.

Kvin- aŭ sesfoje mi jam menciis ĉi tie la francan televidkanalon “TV5 Monde” (TV5 Mondo), ĉar en ĝi mi vidis interesajn dokumentfilmojn. Unu el la programoj nomiĝas “*Secrets d’Histoire*” (Sekretoj de la Historio). Pasintan oktobron mi spektis en “TV5 Monde” elsendon pri la brazila imperiestro Petro la 2-a (pri kiu estas malgranda artikolo en la E-Vikipedio).

Vidu resumon de tiu televid-elsendo (sen la partoj kiuj ne rilatas rekte al la imperiestro):

Li naskiĝis la 2-an de decembro de 1825. Nur unu jaron poste mortis lia patrino.

Same kiel lia avo, ankaŭ lia patro (Petro la 1-a) decidis reiri al Portugalio. Petro la 1-a abdikis en aprilo 1831 la tronon favore al la filo, kiun oni tuj nomis “Petro la 2-a, Konstitucia Imperiestro kaj Ĉiama Defendanto de Brazilo”.

Li estis nur 5-jaraĝa, kaj povintus ekesti movado por faligi la monarkion, sed la brazila popolo ŝatis kaj apogis la infanon, kaj tia movado ne estiĝis.

Evidente 5-jaraĝa infano ne povis regi; do dum kelkaj jaroj regis la landon regentoj. Li mem havis tri sinsekvajn zorgantojn.

Li estis timema kaj silentema, verŝajne pro tio ke li estis kvazaŭ orfo. Sed lia tria zorganto, fakte zorgantino, estis kvazaŭ patrino por li, kaj li tre ŝatis ŝin.

Ĉar li vivis en reĝa palaco (en Rio de Janeiro), li ne povis ludi kun aliaj infanoj. Li pasigis la plej grandan parton de sia tempo lernante kaj legante. Li havis tre grandan kapablon asimili tion kion li legis kaj kion la instruistoj instruis.

Liaj privataj instruistoj estis plejparte francoj, kiuj semis enm li liberalajn idealojn kaj defendis konstitucian monarkion.

Por garantii politikan stabilecon kaj eviti revolucion, pluraj politikistoj sugestis en 1840, ke la nur 14-jaraĝa adoleskanto estu kronata imperiestro. Oni demandis al li, ĉu li akceptus tion. Li diris, ke tio eblos nur kiam li atingos - je la aĝo de 18 - la plen-aĝecon. La politikistoj respondis, ke ili malaltigus la plen-aĝecon, kaj denove demandis, ĉu li akceptus. Tre timeme li jesis. En julio de la sama jaro la parlamento, la “Ĝenerala Asembleo”, deklaris lin plenaĝa, kaj unu jaron poste li estis fakte kronata imperiestro (15-jaraĝa).

Kiam li havis 18 jarojn, la politikistoj opiniis, ke brazila imperiestro bezonas edziĝi kun eŭropa aristokratino, kaj oni elektis por li la Napolan princinon Tereza Kristina de Burbuno-Sicilio.

Li deziris sufiĉe belan edzinon kiun li povus ami kaj kun kiu li povus kunvivadi. Li mem estis bela viro, 1,90 metrojn alta, blonda, bluokula. El Italio oni sendis al li bildon sur kiu la princino estis bela, kaj li akceptis edziĝi kun ŝi. Oni faris kontrakton, kaj la edziĝo okazis en Napolo, sen lia ĉeesto. Kiam, kvar monatojn poste, ŝi alvenis al Rio de Janeiro, li estis elrevigita kaj ege ŝokita, ĉar ŝi estis fakte sufiĉe malbela kaj eĉ iomete lama.

Komence li eĉ ne volis seksumi kun ŝi, sed lia guvernistino persvadis lin akcepti ŝin kiel edzinon. Fakte post kelke da tempo la du geedzoj bone interkompreniĝis, kaj ŝi naskis 4 gefilojn, du filojn (kiuj mortis dum sia infaneco) kaj du filinojn, Isabel kaj Leopoldina.

Li respektis sian edzinon (laŭŝajne li dum kelka tempo nur enamiĝis al la guvernistino), kaj la popolo tre ŝatis la paron: li bela, tre talenta, simpla, timema, laborema, ŝi malavara kaj montranta, ke ŝi, la eŭropanino, ŝatas la brazilanojn.

Venontan semajnon mi daŭrigos la informojn pri tiu imperiestro.